HENDRIK W. VAN LOON: *Van Loon's Geography.

Send Your Orders for These Books to EANA

Books marked by an asterisk () are available from EANA's Book Service, 114 West 16 St., New York 11, N. Y. Today's list includes only translations from English into Esperanto. A survey of original books in Esperanto by American authors will appear later.*

EN KIU LINGVO?

En nia movado kreskas la tendenco redakti gazetojn de landaj asocioj nur en Esperanto. La norvega *Esperanto-Bladet* ŝanĝis sian nomon al *Norvega Esperantisto*, dirante: "La redaktoroj . . . zorgis, ke la enhavo estu nur en Esperanto . . . Fakte multaj ne-Esperantistoj demandis, kial la Esperantista gazeto estas redaktata en la norvega lingvo." La sama organo ankaŭ citis artikolon el *Franca Esperantisto*, kiu diris, ke la oficialaj landaj gazetoj devas esti redaktataj en Esperanto, ĉar ili estas "ligilo de la naciaj Esperantistoj kun la alilandaj."

Aliflanke la sveda *La Espero* ĵus pligrandigis sian svedlingvan parton, kvankam iomete kontraŭ la volo de la redaktoro, S-ro Oscar Svantesson. En la Februara numero li skribis: "La redaktoro mem inklinas al nur-Esperanta redaktado. Oni por tio povas argumenti, ke en gazeto por la internacia lingvo kaj ĝia organizo oni uzu ĝuste tiun internacian lingvon. El eksterlando ni ankaŭ aŭdis plendojn, ke oni ne komprenas la gazeton ĉar tro granda parto de ĝi estas en la sveda lingvo . . . La estrarkunveno de SEF (Sveda Esperanto-Federacio) decidis, ke la gazeto estu parte redaktata en la sveda lingvo. La redaktoro iomete grumblis . . ."

La problemo sendube havas ĝeneralan intereson. Ankaŭ la redaktoro de *Amerika Esperantisto* kaj liaj kunlaborantoj ofte ricevas petojn, ke pli granda parto de la gazeto estu en Esperanto. Tiu peto estas facile komprenebla, speciale se ĝi venas de alilandaj Esperantistoj, kiuj ne scias la anglan lingvon. Tamen nia gazeto, kvankam fiera pri siaj multaj eksterlandaj abonantoj kaj amikoj, ne estas redaktata por plaĉi al ili. Nia ĉefa tasko estas en Usono kaj Kanado.

Kompreneble ekzistas simpla respondo al kritikantoj: Ni povus diri, ke en la preskaŭ 45 jaroj de sia ekzisto *Amerika Esperantisto* ĉiam estis dulingva organo kaj ke estas saĝe sekvi bonan tradicion. Tamen tio eble ne estas sufiĉa klarigo. Kiam cirkonstancoj aliĝas, tradicioj devas sanĝiĝi kun ili.

Ni do konsideru la rolon de nacia Esperanto-gazeto kaj

speciale la taskon de *AE*. Kondiĉoj ne estas la samaj en ĉiuj landoj. En kelkaj landoj estas nun neeble aĉeti Esperanto-librojn eldonitajn eksterlande kaj aboni internaciajn gazetojn. Tie estas grava tasko de landa gazeto havigi al siaj membroj legaĵojn en Esperanto. En Norda Ameriko la situacio ne estas tia. La libroservo de EANA povas liveri centojn da bonegaj libroj taŭgaj por ĉies gusto. Estas ankaŭ tre dezirinde, ke multaj Esperantistoj en Usono kaj Kanado fariĝu abonantoj de *Esperanto* de UEA, *Heroldo de Esperanto*, *La Praktiko*, *Scienca Revuo*, *Malgranda Revuo*, *Juna Vivo*, ktp. Fakte kostas multe malpli importi librojn kaj gazetojn ol eldoni ion similan en nia lando, kie preskostoj estas treege altaj. *Amerika Esperantisto* tute ne deziras imiti aŭ konkurenci la internaciajn gazetojn. Nia ĉefa rolo estas, ne havigi legaĵojn en Esperanto, sed direkti niajn energiojn al tiuj taskoj, kiujn neniu alia povas plenumi.

La fakto, ke multaj Esperantistoj uzas naciajn Esperanto-gazetojn kiel ekzercan materialon, eĉ estas iomete danĝera, ĉar oni facile kutimiĝas al "nacia" stilo kaj al uzo de neĝustaj esprimoj. Ekzemple *La Ponto*, organo de Germana Esperanto-Asocio kaj ĝenerale bonege redaktata, uzas en ĉiu numero ne unufoje, sed kvar- aŭ kvinfoje la vorton "reafranko." Multaj germanaj Esperantistoj ŝajne opinias, ke ĝi estas traduko de *Rückporto* (poŝtmarkoj por respondo). Ili ne scias, ke la vorto ne estas komprenata en aliaj landoj, ĉar ĝi estas nelogika.

Neĝustaj esprimoj kaj "nacia" stilo kelkfoje ankaŭ aperas en internaciaj Esperanto-gazetoj, eĉ la plej bonaj. Tamen la fakto, ke la verkantoj kaj legantoj de la artikoloj loĝas en multaj landoj, kaŭzas variecon kaj ekvilibron inter diversaj naciaj influoj.

Estas malfacile tute eviti nacian esprimmanieron. Redaktoroj ofte laboras rapide, kaj se manuskripto estas ĝenerale interesa kaj bonstile verkita, eĉ tre kritikema redaktoro ne ĉiam rimarkas kelkajn kurbajn kreskaĵojn inter belaj arboj. Naciaj Esperanto-gazetoj povus kontraŭbatali tiun danĝeron

iugrade, se ili publikigus artikolojn de eksterlandaj aŭtoroj. Tamen nur malmultaj faras tion regule.

Kelkaj naciaj Esperanto-gazetoj klopodas kunigi du tute malsamajn taskojn: disvastigi tra la mondo informojn pri sia lando en Esperanto, kaj servi kiel organo de la Esperantomovada en la lando mem. Estas dubinde, ĉu tio estas praktika aranĝo. Tamen varbado por Esperanto en Usono kaj Kanado bezonas tute alian organon, kaj en tiu organo la anglalingva parto estas same grava aŭ eĉ pli grava ol la Esperanta.

Estas vere, ke la plimulto de la *regulaj* legantoj de *Amerika Esperantisto* estas Esperantistoj. Sed ankaŭ estas vere, ke multaj el ili fariĝis Esperantistoj nur post legado de anglalingvaj artikoloj en numero okaze ricevita. *AE* ĉiam disvastigas informojn pri nia lingvo en gravaj rondoj ne-Esperantistaj. Estus dezirinde, ke *AE* troviĝu en kiel eble plej granda nombro da publikaj kaj universitataj bibliotekoj kaj ke ĝi estu sendata regule al multaj eminentuloj.

Kompreneble la anglalingva enhavo de *AE* povas havi sian plenan efikon nur, se niaj membroj *uzas* ĝin por propagando, montrante la gazeton al amikoj kaj kolegoj, disdonante aŭ disvendante ekzemplerojn je oportunaj okazoj. Eĉ por ili mem estas utile, havi artikolojn kaj informojn anglalingvajn, por uzi ilin en paroladoj, artikoloj kaj leteroj al ĵurnaloj. Ili povas uzi la gazeton konstante kiel veran arsenalon de faktoj kaj argumentoj por varbi amikojn kaj lernantojn.

Kompreneble nia gazeto devas enhavi ankaŭ artikolojn kaj informojn en Esperanto. Tio montras al ne-Esperantistoj la aspekton kaj facilecon de la lingvo. Tiel niaj membroj, eĉ la komencantoj, akiras la kutimon legi en Esperanto. Ĉar inter la legantoj de landa organo la nombro de komencantoj kaj nespertuloj estas granda, la stilo devas esti simpla kaj konservativa. Esperantistoj povas havi diversajn opiniojn pri neologismoj kaj la dezirindeco de eksperimentoj pri stilo kaj vortkunmeto. Sed landa gazeto ne estas taŭga loko por tiaj eksperimentoj.

Malfacila problemo estas la publikigo de literaturaj kaj distraj verkoj. Mankas spaco por longaj verkoj. Aliflanke preskaŭ ĉiu ŝatas legi ion, kio estas vere bela aŭ amuza. Rakonto mallonga, streĉe interesa, modelstile verkita, laŭeble kun bonhumora enhavo—jen ideala literaturaĵo por gazeto kiel *AE*. Bedaŭrinde tiaj perloj estas maloftaj, kaj preskaŭ ĉiu Esperanto-gazeto en la mondo avide akirus ilin.

En komparo kun absoluta idealo *Amerika Esperantisto* certe estas neperfekta kaj pliboniginda. Komparante ĝin kun niaj kolegoj alilandaj, la nordamerikaj Esperantistoj tamen neniel bezonas honti nek pri la Esperantlingva nek pri la nacilingva parto de sia gazeto.

KANADANOJ BONE SUBTENAS ESPERANTON

Okcidentaj provincoj de Kanado nun donas bonan rikolton de novaj membroj por EANA, rezulte de la bonaj artikoloj en la gazeto "*Western Producer*." La redaktisto de paĝo "Ĉefe por Virinoj" en tiu gazeto persone havas intereson, kaj promesas presi de tempo al tempo freŝdatan informon pri Esperanto.

Samideano Ralph Lindsey, antaŭe de Willowdale, Ontario, nun vizitas en Anglujo. De tie, tamen, EANA ricevis lian jarkotizon kun la vortoj: "Bonŝancon en via kampanjo por la kresko de la interlingvo en Ameriko!"

G. Norman McKinney de Kingston, Ontario, donacis malavare al la Subtena Kaso de EANA, kvankam li kiel kolegia studento ĉiam baraktas kontraŭ ekonomiaj faktoroj kutime je studentoj. Li skribis: "Mi bedaŭras, ke mi ne povis sendi mian donacon pli frue je la komenco de la jara kampanjo, sed . . . Mi esperas, ke eĉ ĉi tiu malgranda sumo ludos sian parton en sukcesa jaro por nia afero."

RIMARKU: Ĉiuj membroj kaj abonantoj de "Amerika Esperantisto" ricevos specialan someran numeron pri la EANA Kongreso, anstataŭ la kutiman formaton pri propagando aŭ tekniko. Por montri bildojn kaj fotografaĵojn, tiu speciala numero estos presita per ciklostilo kun fotoj per la ofsera metodo.

ESPERANTOLOGIO KAJ INTERLINGVISTIKO

D-RO W. SOLZBACHER

Membro de la Akademio de Esperanto

Interlingvistiko kaj Esperantologio. D-ro W. Manders. 77 paĝoj. Purmerend, Nederlando, 1950. J. Muusses. Havebla de Amerika Esperantisto. 80 cents.

Esperantologio. Internacia Revuo por la Lingvistiko kaj Bibliografio de Esperanto. Red. D-ro Paul Neergaard. Vol. I, N-ro 1, Aŭgusto 1949. 80 paĝoj. Kopenhago, Einar Munksgaard. Abono por unu volumo (proks. 250-300 paĝoj) \$5.00. Abonebla pere de AE.

La Esperantologio kaj Ties Disciplinoj. D-ro Paul Neergaard. En la libro "Tra Densa Mallumo," Kopenhago, 1942, pp. 37-64. Ne plu aĉetebla.

Esperantologiaj Principoj. Dro Eugen Wüster. En la 2-a kaj 3-a partoj de la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. Leipzig, 1928. Hirt & Sohn. Aĉetebla de AE. \$2.25 po volumo. La tuta kolekto (A-Kor) de 4 partoj por \$8.50 afrankite.

La bonega verko de *W. Manders* kaj la unua numero de la grava revuo *Esperantologio* montras ĝojigan kreskon de la intereso pri serioza esploro de la esprimkapablo kaj lingvouzo de Esperanto.

La vorton "Esperantologio" enkondukis *E. Wüster*. *K. Kalocsay* publikigis Esperantologiajn studojn en la *Enciklopedio de Esperanto* (1933-34) kaj en broŝuroj kaj artikoloj. En Japanujo *N. Kawasaki* kaj *J. Okamoto* redaktis gazeton *Esperantologio* en 1930. Post la dua mondmilito *N. Kawasaki* kaj *K. Osaka* eldonis gravajn Esperantologiajn verkojn. Dum la Hitlera okupo de Danujo, en 1942, *P. Neergaard* publikigis interesan studon kun bibliografio. Li priskribis 11 branĉojn ("disciplinojn") de la Esperantologio: Fonetiko, Leksikologio, Etimologio, Sintakso, Semantiko, Stilistiko, Analizo de la Evoluo Filogeneza, Analizo de la Evoluo Ontogeneza, Kompara Esperantologio, Pedagogio, Bibliografio. En sia doktora disertacio pri "Kvin Planlingvoj" (*Vijf Kunsttalen*, recenzo en AE de Sept.-Okt.

1947) *W. Manders* tuŝis diversajn Esperantologiajn problemojn.

La revuo *Esperantologio*, lerte redaktata de D-ro Neergaard, en sia unua numero 80-paĝa, presis longan kaj provoke interesan artikolon de Vilho Setälä pri "Lingva Esprimkapablo kiel Funkcio de la Vorttrezoro." La artikolo enhavas recenzon kaj kritikon de la studoj de la usona lingvisto *George Kingsley Zipf* (aŭtoro de *The Psycho-Biology of Language*) kaj starigas matematikan-statistikan metodon por kompari la vorttrezoron kaj "facilecon" de diversaj lingvoj. La studoj tiurilataj de Setälä ankoraŭ ne estas finitaj, kaj oni senpacience atendas pluajn rezultojn. Tamen mi jam nun konfesas, ke mi estas skeptika pri kelkaj aspektoj de lia metodo.

Artikolo de G. Waringhien pri "la akuzativo en Esperanto" estas konvinka kaj treege interesa pritrakto de tiu grava temo. Sekvas ĝin la unua parto de anglalingva artikolo, "*A comparison between word formation in Esperanto and English*," de D-ro *Olav Reiersol* kaj *R. C. Marble*. La enhavo estas bona, sed la aŭtoroj mallerte klarigas lingvistikajn faktojn, kaj kelkaj el iliaj diroj estas multe tro ĝeneralaj, ekz. la aserto, ke sufiksoj korespondantaj al la Esperanto-sufikso *-eg-* ekzistas "nur malofte" en "la naciaj lingvoj." Se ili konus la italan, hispanan aŭ rusan lingvon, ili ne dirus tion.

La unua numero de *Esperantologio* ankaŭ enhavas artikolon de *J. Régulo Perez* pri "Hispanidaj Neologismoj en Esperanto" kaj la komencon de eksterordinare valora Bibliografio de Esperantologia Literaturo, de D-ro Neergaard.

La nova verko de D-ro Manders konsistas el tri ĉapitroj en la Interlingvistika parto (La interlingvistiko kaj Esperanto—La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen—La naturalismo de IALA) kaj tri ĉapitroj en la Esperantologia parto (Taskoj de la Esperantologio—La evoluo de Esperanto; lingva korekteco—Kompara Esperantologio). La libro prezentas fundan analizon de diversaj problemoj, pri kiuj ekzistas konfuzo. Mi precipe ŝatis la ĉapitron pri "La evoluo de

Esperanto.” Ĝi komenciĝas jene: “Ne malofte oni povas legi kaj aŭdi, ke Esperanto estas lingvo libere evoluanta ĝuste kiel la lingvoj naciaj. En tiu aplomba aserto kaŝiĝas tri gravaj eraroj: a) La lingvoj naciaj ne havas liberan evoluon; b) Esperanto ne libere evoluas; c) Esperanto ne evoluas ĝuste kiel la naciaj lingvoj.” Argumentoj, per kiuj D-ro Manders subtenas tiujn asertojn, ŝajnas al mi tre atentindaj.

D-ro Manders ankaŭ donas bonegan kritikan analizon de la “Variantes,” diversaj lingvoprojektoj de IALA (P, M, C, K, E), kaj montras la danĝeran seneliran vojon, en kiun kondukas la “naturalista” tendenco, t.e. la serĉo de tute “natura” apero kaj strukturo por internacia lingvo.

La verko de D-ro Manders sendube meritas seriozan studon de fakuloj. Sed ĝi ankaŭ enhavas kritikindaĵojn. La difino de Interlingvistiko ŝajnas al mi neakceptebla. D-ro Manders diras, ke ĝi “baziĝas sur la konvinko, ke nek Esperanto nek iu el la aliaj ekzistantaj planlingvoj prezentas tute kontentigan solvon.” Tia “bazo” estas *nescienca*. Scienco devas havi nenian antaŭjuĝon pozitivan aŭ negativan. Interlingvistiko povas ekzameni, ĉu Esperanto estas kontentiga de diversaj vidpunktoj, sed ĝi ne povas eliri de la “bazo,” ke ĝi *ne* estas kontentiga. Laŭ la aŭtoro “interlingvistoj” estas nur tiuj, kiuj klopodas fabriki novajn lingvoprojektojn. Tia uzo de la termino estas bedaŭrinda. *Amerika Esperantisto* de pli ol ses jaroj uzas sur kovrilo la vorton *Interlanguage*, indikante, ke ni konsideras Esperanton la solvo de la interlingva problemo. Kial ni lasu la vorton, kiu estas tre taŭga, al “la aliaj”? Ŝajnas al mi, ke la Esperantologio ne estas io ekster la Interlingvistiko, sed estas parto, eĉ la plej grava parto, de tiu scienco.

D-ro Manders konsentas, ke ekzistas bonaj argumentoj por tia uzo de la vorto, sed “decidis lasi al la termino ĝian originalan signifon.” Li erare opinias, ke tiun “originalan signifon” donis al ĝi *Jespersen* en 1929. Fakte la vorto Interlingvo unue estis uzata de *Giuseppe Peano* en 1908, kiam sub lia prezido la antaŭa Volapük-Akademio (*Kadem Bevümetik*

Volapüka, poste *Akademi Internasional de Lingu Universal*) ŝanĝis sian nomon al *Academia pro Interlingua*. En 1915 Peano eldonis kvinlingvan *Vocabulario Commune pro usu de interlinguistas*.

Alia kritikinda detalo estas la maniero, en kiu D-ro Manders pritraktas la rolon kaj signifon de IALA. Ŝajne li eĉ ne komprenis la nomon de tiu asocio, kiun li tradukis kiel "internacia helplingva asocio." Fakte la nomo estas "International Auxiliary Language Association in the United States," t.e. "Usona Asocio por Internacia Helplingvo." La adjektivo "internacia" rilatas al lingvo, ne al asocio. Manders ankaŭ iomete kreas la impreson, ke IALA estas asocio de lingvistoj. Laŭ mia scio eĉ ne unu membro de la Direkta Komitato estas profesia lingvisto, kaj ĉiuj membroj de tiu Komitato estas usonanoj! Kelkaj lingvistoj kunlaboras en diversaj "konsilaj" komitatoj, sed ili ja estas nomitaj de la Direkta Komitato, aŭ de S-ino Morris, ĝia "animo kaj motoro." Fakte IALA reprezentas malpli da lingvistika aŭtoritato ol, ekzemple, la Akademio de Esperanto. Cetere kelkaj el la lingvistoj kiuj iam laboris kun IALA, ne plu faras tion. Ili malkonsentas inter si mem kaj kun S-ino Morris pri gravaj principoj. Mi tute ne deziras nei, ke IALA havas realajn meritojn kaj ke kelkaj produktoj de ĝia laboro estas uzeblaj por interlingvistoj kaj Esperantologoj. Sed D-ro Manders grave eraris, farante kategoriajn asertojn neniel pruveblajn, kiel ekz.: "IALA estas la organizo, en kiu la moderna interlingvistika aktiveco kulminas . . . Pri la lingvistika kompetenteco de ĝiaj kunlaborantoj povas esti neniue dubo."

Estas bedaŭrinde, ke legantoj, kies plimulto estos Esperantistoj sciantaj malmulte aŭ nenion pri tiu organizo, ricevas klarigojn, kiuj troigas la rolon kaj signifon de IALA. Estas bone, sekvi la konsilon de D-ro Manders, esti "sufiĉe larĝmensaj por ne indigne skandaligi, kiam la enhavo ne kongruas kun la konataj propagandaj reklamoj" de kelkaj Esperantistoj. Sed estas same utile, rekomendi al li, ke li ne tro facile kreu al la "propagandaj reklamoj" de aliaj.

LETERO DE JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Karaj usonaj samideanoj,

TOKIO, 16 majo 1950

Ni, en la nomo de la japanaj esperantistoj, salutas vin per nia membro s-ro Yukiteru Ozaki, japana senatano. S-ro Ozaki vizitas vian landon kiel akompananto de sia patro s-ro Yukio Ozaki, 91-jara parlamentano altrespektata de la japana popolo kiel nobla politikisto kaj precipe de ni esperantistoj kiel fervora simpatianto de nia movado.

Malgraŭ multaj malfaciloj ni laboras ĉi tie ĉiam energie kaj akiradas pli kaj pli da novaj samideanoj en plej vasta kampo. Speciale granda estas nia sukceso en la organizado de esperantistoj en la naturscienca sfero. Lastatempe pli ol 80 eminentaj universitataj profesoroj kaj inĝenieroj de gravaj laboratorioj subskribis "promeson" publikigi ĉiujare almenaŭ unu fakan disertacion en Esperanto . . . Ni esperas, ke vi bonvolu helpi nian agadon. Kaj niaflanke ni estas ĉiam pretaj kunlabori kun vi, transmaraj kolegoj.

(JEI) *Seiho Nishi*, Prezidanto — *Ŝibej Mijake*, Direktoro

EMINENTAJ JAPANAJ ESPERANTISTOJ EN USONO

Yukio Ozaki, 91-jara parlamentano kaj eminentulo de Japanlando, antaŭa urbestro de Tokio, vizitas en Usono. Lia filo, *Yukiteru Ozaki*, nuntempa membro de la japana parlamento, akompanas lin. D-ro Ozaki estas longtempa kaj altestimata patrono de la japana Esperanto-movado. La filo, Yukiteru, bone parolas Esperante. Dum la vizito en Nov-Jorko, la redaktistoj de AE havis honoron renkonti la patron kaj la fratinojn; kaj poste ĝuis duhoran feston kun la filo, Yukiteru, en kiu Esperanto estis la komuna lingvo. Estas interese, ke estis esperantisto, D-ro Yukio Ozaki, kiu prezentis al la urbo Vaŝingtono la belajn ĉerizarbojn, pri kiuj la urbo kaj ja la tuta lando nun fieras. Al niaj eminentaj gastoj ni diras bonvenon, kaj ni esperas, ke ilia resto en Usono multe helpos en bonega interkompreno inter niaj du nacioj.

DIVERSAJ ANONCOJ

NOVA GAZETO "PROBLEMOJ": Se interesas vin problemoj pri la batalo kontraŭ komunistaj tendencoj en nia movado, legu kaj subtenu novan gazeton tute en Esperanto, "PROBLEMOJ." Tiu gazeto malkovras kaj informas pri ĉiuj subfosaj influoj en Esperantujo. Petu senpagan prov-ekzempleron ĉe: "Problemoj," P. O. Box 205, Old Chelsea Station, New York, N. Y.

METAL GREEN STARS: The Central Office has just received a new supply of beautifully enameled metal stars, and offers them at a new low price. Green star on white ground, gold edge, $\frac{3}{8}$ " in diameter, button or brooch style, only 50c each, postpaid. Order from EANA, 114 West 16th St., New York 11, N. Y.

INDIAN BEAD STARS: Unique, native Indian beadwork. Tiny green beads on white ground also made of beads, sewed on fine thin buckskin. $1\frac{1}{4}$ " diameter. These truly "American" green stars, are produced by genuine native Indian handwork. Guaranteed to please all who appreciate the finest in artistic native handicraft. Superb for ladies. With neat gold safety catch, 85c each. Order from EANA.

GREEN STARS IN CERAMIC: A decorative green glazed ceramic pin $1\frac{1}{4}$ " in diameter, with safety catch. Very effective as a scatter pin for ladies, 65c each, postpaid. Order from Central Office of EANA.

PHOTOGRAPHS IN STAMP FORM: They will personalize you, warmly, intimately, in a modern way. Send Joseph Leaby any size photograph or negative, and he will reproduce photo stamps for YOU! Each photo stamp is a glossy photograph, perforated and gummed. Black and white, 100 for \$2; Color toned, 100 for \$2.50. Send your order to: Joseph Leaby, 1754 Lanier Pl., N. W., Washington 9, D. C.

ESPERANTO - KRONIKO

Komandanto Richard E. Lambert, Plainfield, N. J., antaŭnelonge ricevis specialan honor-medalon de la Ĉina Nacia Registaro. Jam en 1947 la medalo kaj speciala atesto estis oficiale donitaj, sed nur nun venis la permeso de la Usona Departemento de Mararmeo por ricevi ilin. La medalo estas bela insigno de la ordeno "Yun Hui" (Nubo kaj Standardo). Dum la milito, Komandanto Lambert estris la Departementon de Provizoj ĉe Guantanamo-Golfo, Kubo, kie li direktis la ekipadon de tuta ŝiparo por la Ĉina Registaro, kaj gvidis la instruadon de 72 ĉinaj oficiroj kaj 1000 ŝipanoj por servado surŝipe. La Komandanto kaj lia edzino, Muriel Collins Lambert, aktive interesigas pri la Esperanto-movado. Ni sincere gratulas pro la bone meritita honoro.

Usonaj Esperanto-Propagandiloj fariĝas tre popularaj eksterlande. La broŝureto PGL N-ro 183 (Personal Growth Leaflet) de la Nacia Eduka Asocio, kaj la malgranda folio "For International Understanding" ricevis fervoran aplaudon en diversaj landoj. En Svedlando, la estroj de KELI, Ges-roj Alamo-Sandgren, utiligis kelkcentojn de ambaŭ specoj. La Sveda Esperanto-Federacio tradukis ilin svede, kaj nun dissendas la svedan eldonon grandskale en Svedlando. EANA ricevis peton de UEA Propaganda Sekcio, ke ni sendu kvanton de ambaŭ specoj por uzo kun cirkulero al landaj asocioj. Irlanda reprezentanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj mendis 200 ekz. de PGL por sendi al instruistoj tra la lando. La oficejo "Esperanto en la Instruado," Nederlando, aranĝis por sendi la libreton PGL al ĉiu membro de la Parlamento de Nederlando. Ni estu fieraj, do, pri niaj propagandiloj, kaj vaste utiligu ilin ĉi tie en Nord-Ameriko. EANA sendas la folion "For Better International Understanding" senpage. PGL N-ro 183 estas aĉetebla je tre malalta kosto: 25 por 25c; 100 por \$1; 1000 por nur \$7.50; afrankite. Utiligu ilin por *Esperanto en Ameriko*. Ili jam pruviĝis efikaj por varbi novajn membrojn.

ESPERANTO - KRONIKO

Profesoro Gaston Waringhien, Membro de la Akademio, skribis al ni pri la recenzoj de la "Leteroj de Zamenhof." Li diris, ke li *ne* korektis la stilon de Zamenhof, sed nenion ŝanĝis "krom se temis pri evidenta plumeraro, aŭ pri formo, kiun poste Zamenhof forlasis, deklarante ĝin malbona, aŭ pri vorto, kiu poste arkaikiĝis; sed eĉ en tiuj okazoj, mi ĉiam zorge montris la originan tekston, tiel ke oni povas ĉiam apogi sin sur la vera Zamenhofs bazo." La recenzinto respondas al tio, ke la plimulto de la stilaj ŝanĝoj estas en tekstoj de Boirac, Bourlet kaj aliaj, sed ke ankaŭ troviĝas kelkaj en tekstoj de Zamenhof, en la Unua Volumo sur paĝoj 44, 127, 171, 183, 211, 345, 347, 348 350.

Rilate al la leteroj de Zamenhof pri la usona Esperanto-movado Profesoro Waringhien skribis ke li ne "elektis" ilin, sed publikigis ĉiujn leterojn pri Usono, kiujn li trovis en la arkivoj de la iama Centra Oficejo. Ni dankas lin pro tiu grava informo. Komprenoble la arkivoj en Paris enhavis nur malgrandan parton de la leteroj de Zamenhof. Certe ekzistas ankoraŭ aliaj leteroj ĝis nun nekonataj kaj nepublikigitaj, en kiuj Zamenhof diris ion favoran aŭ malfavoran pri la Esperanto-movado en Usono, la Universala Kongreso en Washington kaj similaj aferoj. Estus grave kolekti la tekstojn por posta publikigo. Ni do urĝe petas ĉiujn gelegantojn, kiuj posedas tiajn leterojn, ke ili sendu al AE la originalojn (kiuj estos resendataj post kelkaj tagoj) aŭ fotokopiojn. Aliaj kopioj estas malpli utilaj.

La UEA-Jarlibro por 1950 (Unua Parto) aperis kun tre interesa enhavo. Ĝi estas 247-paĝa kaj enhavas multajn sciindaĵojn kaj la adresaron de delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj. Ĉiuj individuaj membroj de UEA ricevas ĝin.

AE en Bibliotekoj: Diversaj membroj jam prizorgis pri tio en siaj urboj. Ĉu vi atentis pri AE en via urbo?

ESPERANTO - KRONIKO

La telefonlibroj de 5 el la 7 plej grandaj urboj de Usono nun havas enskribon sub la vorto "Esperanto": New York, Chicago, Philadelphia, Los Angeles, Cleveland. Multaj aliaj gravaj urboj bedaŭrinde havas nenian enskribon. Estas grave, ke Esperanto-kluboj atentu tiun aferon, pri kiu kelkaj EANA-kongresoj voĉdonis deziresprimojn. Se la Prezidanto aŭ Sekretario ne havas taŭgan numeron, sub kiu ili povas doni informojn dum la tago, estas utile trovi iun bonan Esperantiston, kiu estas preta doni sian telefonnumeron por informpetoj, eĉ se en kelkaj kazoj liaj informoj konsistas nur en sciigo de la adresoj.

En "Scienca Revuo" la redaktoro, *W. P. Roelofs*, demandis: "Kiel traduki en Esperanton la anglan esprimon 'full employment'?" La esprimo fariĝis preskaŭ internacia faka termino sociologia kaj politika. WPR mencias la tradukojn "plena ebleco de dungigo," "plena dungigo," "plena dungo," "plena dungado," dirante ke li volonte aŭdos la opinion de aliaj pri ĉi tiu demando.

Profesoro J. B. Mello e Souza, eminenta Esperantisto de Brazilo, sciigas nin, ke li vizitos Usonon komence en Junio. Elirinte el Rio-de-Janeiro je la 14-a per la vaporŝipo "Brazil," li estos en Nov-Jorko je la 26-a de Junio. Profesoro Mello e Souza, kiu havas aliajn gravajn postenojn en Brazilo, estas ankaŭ Prezidanto de la skolta movado en sia lando, kaj laŭ invito de "American Boy Scouts Association" li ĉeestos skoltjamboreon en fama loko "Valley Forge." Tuj post tiu kunveno, ni anticipas lian viziton al la Jubilea Kongreso de EANA en Letchworth Park. Li venas ankaŭ por viziti sian filon, kapitano Horacio Mello e Souza, ĉe la Maristara Akademio de Annapolis. En la jaro 1910, Profesoro Mello e Souza oficiale partoprenis en la Sesa Universala Kongreso en Vaŝingtono. La Usona Esperantistaro kore bonvenigas nian eminentan gaston.

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

Hispanujo. F-ino Maria Cordorniu, C. Antigua de Valencia, 9-1, Barcelona (P.N.). 36-j. sekretariino dez. kor. kun usonanoj.

Hispanujo. J. J. Forné, Calle Medines 3, Valencia. Dez. kor. en Esperanto kaj angla lingvoj.

Italujo. Donadoni Giuseppe, Corso Goivanni Lanza 100, Torino. 23-j. junulo dez. kor. pri muziko nuntempa.

Italujo. F-ino Clelia Catalano, Via Vigna Nuova 5, Firenze. 26-j. dez. kor., interŝ. IPK kun gesamideanoj.

Japanujo. Kunihiro Tamura, Sekiguçi (Sionomaçi) Niigata-ken. 20-j. junulo dez. kor.

Japanujo. Esperanta Koresponda Grupo, 260 Oka-Shinamachi, Hirakata, Osaka. Ducent gegrupanoj dez. kor. kaj interŝ. il. gazet., PK, PM. Respondo garantiata.

Kubo. Marcelino Torrado, Jr., Gonzalo de Quesada 552, Camagüey. Dez. kor. pri Usona vivo.

Turkujo. Erman Göksel, Bagdat Cad, No. 48, Kiziltoprak, Istanbul. 19-j. junulo dez. kor., interŝ. PK kaj fotojn.

Japanujo. Matuzo Iba, Koaraigi-Kenkum, Takasima, Sigaken. 24-j. fraŭlo dez. kor. kun Esperantistino, interŝ. gazetojn.

Japanujo. Doi-Morio ĉe Kemmin-Kaĉo-Hospitalo, 25 Noda-mura, Nagaoka-gun, Koçi-Ken. 34-j. kuracisto (ginekologo) dez. kor. kun kuracistoj aŭ medicinaj studentoj pri medicina monografio.

Cekoslovakio. F-ino Dana Mottlova, Strelecka 588, Hradec Králove. Koncertpianistino dez. kor.

Japanujo. Masaru Okuda, 1088 Tarumi-Ĉo, cu, Mie. 22-j. medicina studento, dez. interŝ. PM.

Germanujo. Hellmuth Hansen, (22c) Walheim 89, Bez. Aachen. Dez. kor.

Italujo. Franco G. Bossi, via Sofocle 1, Milano. Dez. kor. kun poŝtmarkkolekt. kaj interŝ. P.M.

Japanujo. Morimura Kazuo, 553 Tateishi-Machi, Katushika-Ku, Tokio. Dez. kor. pri desegnaĵoj.

Japanujo. Sunao Sato, 89-II Takamatu-dori, Miyazaki-Si. 20-jara studento, dez. kor. pri belarto, literaturo, foto, ktp, nepre respondos.

Japanujo. Hiroo Kimura, c/o Kyoto University, Economic Faculty, Yoshida, Sakyo, Kyoto. Dez. kor. pri ĉiuj artaĵoj aŭ aliaj temoj kun usonaj junaj gesamideanoj.

TWO OUTSTANDING LANGUAGE WORKS

These are "Musts" for Your Library

NOTE, that when you buy books from the *Esperanto Association of North America*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

"Universala Esperanto Metodo" by Dr. Wm. S. Benson

This great Esperanto book is again available. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Pronunciation of Esperanto alphabet and table of correlatives in 36 languages. Wonderful picture-method of instruction and definition. Complete textbook, reader, dictionary — also *krestomatia* of fables, stories, humor, etc., all profusely illustrated — complete picture-dictionary in Esperanto, with most common words given in 40 languages. Encyclopedic and unique. Large volume, beautifully cloth bound, stamped in gold, 560 pp., all for \$6.00 postpaid.

"The World's Chief Languages" by Dr. Mario A. Pei

Famous guide to the languages of the entire world, incl. *ESPERANTO*. Formerly titled "*Languages for War and Peace*." New 3rd edition. Full grammatical surveys of world's great languages, with vocabularies — also alphabets and illustrations of the lesser languages, incl. many strange native tongues; and language history with linguistic maps — all written in interesting and easy-to-understand style. Text and vocabulary equivalents in English. A reliable guide for every student of language and languages. Big cloth volume, 663 pp., price \$6.00 postpaid.

THE LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

ORDER YOUR LINGUAPHONE FROM E.A.N.A.

You can learn *ESPERANTO*, or any of 27 other languages, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through E.A.N.A. for benefits to both yourself and your Central Office.


The regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$50. Special favorable arrangements for Members, Teachers and Clubs. Also *Canadian Members* will likewise receive favorable arrangements, and pay in Canada to Canadian agency without customs duty, etc. Write for details of our special *Linguaphone* offers.

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. And it's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. *All* designed so you can *master* Esperanto.



The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage*."
- (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow 'Study Guide' (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "Connor Course," as described above, will be sent postpaid for only \$36. **FOR GROUP STUDY:** Buy one complete master course at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide. Delivered with a full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

Doris Tappan Connor, 114 W. 16 St. New York, N.Y.